Prezo: 7 €
www.satesperanto.org
Majo-Junio 2015 | n-ro 5–6 (1319-1320)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!



Temdosiero "Novaj situacioj ĉe politikaj partioj"



SEminario por VIrinoj - SEVI, p. 27

# ✍ REDAKTANGULO ✍

Karaj legantoj,

Jen la maja-junia numero de Sennaciulo, kun denove sufiĉe ampleksa tem-dosiero pri novaj situacioj ĉe politikaj partioj. Fakte, du el la kontribuoj estas daŭrigendaj en posta numero, ĉar ne eblis ĉion enmeti sen ekstermezure kreskigi la amplekson de Sennaciulo. Alia samdirekta indiko pri vigleco de kontribuantoj estas, ke jam dum la kompilado de tiu maja-junia numero ni konstatis, ke preskaŭ jam estas sufiĉe por plenigi la juli-aŭgustan.

Pri la enhavo de venontjara kolekto de Sennaciulo, kaj pri aliaj aspektoj de la vivo de SAT, eblos detale diskuti dum la kongreso en Nitro. Por prepari tiujn diskutojn, vi trovos diversajn raportojn fine de ĉi-numero.

Ankaŭ aperas informoj pri rezulto de la jarfine okazinta referendumo. Jen okazo atentigi, ke aldone al PK-anoj kaj membroj de la Ĝenerala Konsilantaro, la bonorda administra funkciado de SAT ankaŭ dependas de ĝia perantoreto. Kolekto de kotizoj kaj ĝisdatigo de kontakt-informoj estas rutinaj sed ege necesaj taskoj por certigi daŭrajn ligojn inter ĉiuj SAT-anoj.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La Redaktoskipo

# Venontaj limdatoj

Venontaj limdatoj

Limdato por sendo de artikoloj por Sennacieca Revuo 2016 estas la 31a de decembro 2015.

Limdato por sendo de materialo por la septembro-oktobra numero estas la 31a de aŭgusto.

**Atentigo pri kotizpagoj en Bulgario**

Kamaradoj loĝantaj en Bulgario estas petitaj de nun ĝiri siajn kotizojn rekte al la SAT-konto en Parizo, aŭ tra UEA. Sinproponoj al la PK pri transpreno de la peranta tasko ankaŭ estas bonvenaj.

# Enhavo

Enhavo


## Temdosiero "Novaj situacioj ĉe politikaj partioj"

4 Enkonduko KANI
El la diskutejo
6 Panoramo el Hispanio KANI
8 Kiel aparato malproksimiĝas de sia bazo (1-a parto) JULIAN MISCHI
10 Politikaj partioj en Svislando R. SCHNELLER
11 La komuna saĝo: la sesa sistemo partia kaj la vivanta viglo de la revolucio usona (1-a parto) TRAPINOARO LAUVOLE
13 Komunista platformo de la partio "La Maldekstruloj" en Germanio DONJO & CEZ

## Socio

14 La helpo kiu mortigos MICHEL MARKO
Anarĥio en Roĵavo: liberecana revolucio en Mezoriento NXC
15 Mesaĝoj de kamaradoj anarĥiistoj batalantaj en Kobano NXC
16 Zamenhof pravis! ROGER CONDON
18 Polaj profesoroj kontraŭas klerikalismigon de Pollando! MIR-KO
20 Ukrainio: neebla pactraktaĵo ROLAND PLATTEAU

## Agroekologio kaj Klimato

21 La historia identeco de agroekologio kaj la senrajta alproprigo ROBIN' BETO

## Beletra Angulo

22 Interparolo kun kamarado Lenin VLADIMIR MAJAKOVSKIJ
Ĉineca evoluo CEZAR
23 Eduardo Galeano forpasis MIGUEL FERNÁNDEZ
La ĉantaĝulo ROGER CONDON

## Intelekta Memdefendo

25 Solvoj de la cerbumigoj de l' n-ro Marto-Aprilo
Novaj cerbumigoj DIANA RIŜAR
26 Kompatinda kaprino VITO

## Tra Esperantio

26 Rezigno pri Civitaneco F. DEGOUL
27 SEminario por VIrinoj - SEVI PRIVAS TCHIKPE & MIREILLE GROSJEAN

## El la Leterkesto

29 Korespondpeto LEO WEBER
Reago de Nélida B. Monasterio
Reago de Michel Marko

## El la SAT-administrejo

30 Rezulto pri la referendumo 2014
31 Financa Bilanco pri la SAT-Kongreso 2014
Agadraporto de la Plenum-Komitato por la periodo de Junio 2014 ĝis Majo 2015
34 Raporto de Ĝenerala Konsilantaro 2014-2015
35 Financa raporto
37 Landaj Perantoj | Kotizoj | Praktikaj informoj | Preseraroj | Donacoj
38 Eldonaĵoj de SAT-EFK


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*
***sennaciulo.redaktejo@gmail.com***